

## & Nevola mortiginto:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 2627 paŝoj dum 30 minutoj. Verkis Vasilij Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,5:37> (

/La MiMi LaLa dore miimi;mi rere dodo rere mimi; La MiMi LaLa dore miimi;mi rere dodo redo mimi;

(#Rekantaĵo: la mimi lala mimi rere dore mi; la mimi lala mimi rere doTi La; mimi rere doTi La a)  
)×71 )+

### (&Strofoj:

#### '& Parto unua:

'1 Varmega tago jam finiĝis, ; Tre bela sun' adiaŭ diris ; Al tero, kaj alproksimiĝis ; trankvila nokto. Mi reiris

(×: **Kreskas arbaro, verde vestas teron branĉ'** ; **Malbona faro vere estas akra tranĉ'** ; **Verde vestas teron branĉ'**.)

'2 Al domo mia kaj koleris, ; Ĉar tutan tagon mi ĉasadis, ; Kaj mia ĉaso ne prosperis: ; Mi eĉ ĉasaĵon ne vidadis, .....

'3 Sur mia voj' en unu loko ; Al lago venis mi, kaj vidas ; Sur ĝia bordo kun fiŝhoko ; Konata maljunulo sidas. ....

'4 Mi lin salutis: "helpu Dio!" ; – Mi dankas, – maljunulo diras. ; "Nu, eble, vi, pro kompanio, ; Kun mi jam hejmen kune iras?" .....

'5 – Ho, ne, sinjoro! mi intencas ; Tre longe sidi, – dankas kore; Vi finis ĉason, mi komencas, – ; Nenion kaptis mi ankoraŭ. ....

'6 Sed eble vi malmulte provos ; Fiŝetojn kapti? Mi fiŝhokon ; Provizan havas, tial povos ; Al vi mi servi, – prenu lokon. – .....

'7 Mi tuj konsentis, ĉar laciĝis ; Mi kaj apenaŭ mi iradis, – Fiŝhokon prenis kaj sidiĝis ; Sur laga bord'. Ni paroladis .....

'8 Pri mia ĉaso malprospera. ; Al maljunulo mi rakontis ; Kun fajro forta kaj sincera ; Pri tio, kion mi renkontis .....

'9 En ĉaso, li do tre atente ; Rakonton mian aŭskultadis ; Kaj nur korkaĵon diligente ; Sur akvosupraĵo observadis. -

#### '& Parto dua:

'10 Mi eksilentis. Maljunulo ; Fiŝhokon sian plibonigis ; Kaj diris: "kiam mi junulo ; Ankoraŭ estis, mi pasigis .....

'11 En ĉaso tutan tempon mian. ; Sed nun mi ĉasi tute ĉesis, ; Forĵetis eĉ pafilon mian. ; Kajkiel teni ĝin – forgesis." .....

'12 Je tio miris mi kaj petis, ; Ke li sciigu min, pro kio ; pafilon, ĉason li forĵetis? ; "Tre longa estas historio!" .....

'13 Al mi malgaje li rediris, ; Per griza kapo balancante, ; Kaj li subite eksopiris, ; Rakonti, ŝajne, ne volante. ....

'14 Sed jen silenton li ĉesigas ; Kaj, cigareton ekfumante, ; Komencis: "eble vi devigas ; Min rakontadi, atendante .....

'15 Ekaŭdi ĝojan historion? ; Se tiel estas, mi certigi ; Vin devas, ke al vi nenion ; tre gajan povas mi sciigi!" .....

'16 – Vi vane opinias, – ; Rediris mi al maljunulo. ; "Ne vane, ĉar mi bone scias, ; Pri kio pensas eĉ junulo!" .....

'17 Kaj ree li eksilentinte, ; Fiŝhokon sian plibonigis; Sed post momento, ekĝeminte, ; Li jam sen halto ekdaŭrigis. ....

#### '& Parto tria:

'18 "Aŭskultu. Antaŭ dudek jaroj ; Mi ofte kun pafil' ĉasadis, ; Kaj jen en tiuj ĉi arbaroj ; Mi multajn tagojn pasigadis. ....

'19 Ankoraŭ tiam troviĝadis ; Multego da sovaĝaj kaproj, ; Kaj en arbar' sin renkontadis ; Eĉ ursoj kaj teruraj aproj. ....

'20 Jen iam vintre en mateno ; Sur kampo, apud mem arbaro ; Ĉasistoj estis en kunveno. ; Mi ankaŭ estis. Jam hundaro .....

'21 De ĉeno forte sin ŝiradis ; Kaj, ne havante paciencon, ; Aeron frostan nur flaradis, ; Sentante baldaŭ jam komencon. ....

'22 Ni ankaŭ, ĉason atendante, ; malpaciencaj jam fariĝis, ; Kaj, tre mallaŭte parolante, ; En ĉeno ĉiuj ni stariĝis. ....

### '& Parto kvara:

'23 Subite en densejo sonis ; Trumpeto forta, – mi ekstremis ; Per tio ĝi signalon donis, ; Ke estas ursoj. Mi ekpemis .....

'24 Pafilon mian kaj instinkte ; Nevole ĉirkaŭ-ekrigardis ; De mi porksime, sin arminte ; Tre bone, oficiro staris. ....

'25 En manoj tenis li pafilon, ; Ĉe zono larĝa kaj lakita ; Pistolon hyavis kaj tranĉilon. ; Mi estis tute konvinkita, .....

'26 Ke tiel brava militisto ; Sendube estas kuraĝulo, ; Ke vera estas li ĉasisto ; Kaj tial estos ne timulo ; .....

'27 Sed bedaŭrinde mi eraris ! ; Mi tamen devas plu rakonti. ; Mi ĉe arbara rando staris ; Kaj urson tie ĉi renkonti .....

'28 Mi tre esperis, ĉar mi scias ; Kutimojn ursajn. Jen mi aŭdas, – ; Al mi "vin gardu" iu krias. ; Antaŭen bone mi rigardas .....

'29 Kaj, – kia granda mirindaĵo ! – ; Subite mi proksime vidas ; Ursegon: ĝi en arbeto ; Senmove kaj silente sidas .....

'30 Kaj kvazaŭ pensas, kien devas ; Ĝi kuri? ĉie estas baro. ; Jen multepeze ĝi sin levas ; Kaj tuj eliras el arbaro. ....

### '& Parto kvina:

'31 Mi kelkajn paŝojn posten faris, ; Min al pafilo jam almetis, ; Kaj urson pafi min preparis, ; Sed... ho, teruro! mi faletis .....

'32 Je ŝtipo kaj subite teron ; Mi tute falis kaj... ekpafis. ; Por mi ekvidis mi danĝeron ; Grandegan: urson mi ne trafis ! .....

'33 Ĝi tre rapide kun kriego ; Sur min sin ĵetis kaj kun forto ; Min premis, ŝiris per ungego. ; Jam tre proksime estis morto ! .....

'34 Mi oficiron ekrigardis – ; Kaj kun teruro mi ekvidis, ; Ke li sin mem nur bone gardis, ; Ĉar li jam kuri for rapidis. ....

'35 Tranĉilon preni mi intencis, – ; Ne povis, ĉar min urso premis. ; Mi fortojn perdi jam komencis ; Kaj de doloro mi nur ĝemis. ....

### '& Parto sesa:

'36 Subite pafu! Urso saltis ; De mi tuj, tute min lasinte, ; Kaj ĝi de mi proksime haltis. – ; Jen liberecon eksentinte, .....

'37 Min levis mi kun malfacilo, ; Al urso mem mi alŝteliĝis ; Kaj ĝin ekbatis per tranĉilo ; En gorĝon rekte ĝi eniĝis. ....

'38 Mi bone trafis, – urso mortis. ; Ĉasistoj ĉiuj tuj kunvenis, – ; Sed mi malforton ne elportis ; Kaj falis. Ili min subtenis .....

'39 Kaj portis al glitveturilo ; Subite vidas mi – aliris ; Kun sia bela batalilo ; Jen oficiro ; li ekmiris: .....

'40 "Ho, kio tie ĉi fariĝis? ; Mi estas tute ekfrapita! ; Sinjoro, vi ekmalsaniĝis?" ; Per tio ĉi indignita, .....

'41 Ekkriis mi: "arogantulo! ; Vi ĉion tute bone vidis, ; Sed vi, malnobla timemulo, ; De mi forkuri ekrapidis!" .....

'42 Kaj en incito mi minuta ; Min levis el glitveturilo ; Kaj lin kun mia forto tuta ; mi tuj ekbatis per tranĉilo. ....

'43 Mi videis sangon, aŭdis krion, ; Sed mi nenion jam komprenis, ; Ĉar tute perdis mi konscion. ; Mi falis, – iu min subtenis. ....

### '& Parto sepa:

'44 Mi sen konscio longe restis, ; Kaj kiam mi ekkonsciiĝis, – ; en malsanejo mi jam estis. ; Vespero jam alproksimiĝis. ....

'45 Nenion tute mi komprenis. ; Tre longe kuŝis mi silente ; Kaj ion rememori penis. ; Jen venis iu. Tre atente .....

'46 Li ekrigardis min kaj diris : "Nu, ĉu pli bone vi vin sentas?" ; Li tute ĝis mi mem aliris, ; Murmuris: "bone, mi kontentas..." .....

'47 Proksime li de mi sidiĝis ; Kaj ekparolis: "nu, ĉasisto, ; Vi eble jam ekprudentiĝis? ; Respondos jam al esploristo?" .....

'48 Je tio ĉi mi tre ekmiris ; Kaj ne respondis ; li daŭrigis ; "Al mi pli frue vi ja diris, ; Ke lin sendube vi mortigis." .....

'49 Subite ĉion mi komprenis. ; Ekkriis laŭte mi, ekpenis ; Min levi, – kaj denove svenis ; Malsana korpo ne eltenis ! .....

### **'& Parto oka:**

'50 Terure tempon mi pasigis! ; Kaj mia korpom kaj animo ; Suferis... ho, de viv' senigis ; Mi homon! Kun senfina timo, .....

'51 Malpacience mi atendis ; Severan juĝon, – mi ploradis, ; Al Dio mi petegojn sendis, ; Mi ĝemis, mi frezeziĝadis! .....

'52 Sed baldaŭ tute mi saniĝis, ; Suferojn parte mi eltenis ; Kaj nun pli forta mi fariĝis. Kaj jen terura tago venis: .....

'53 Nun mi, anstataŭ malsanejo, ; Kun malmodera tremo vidis, ; Ke en majesta mi juĝejo ; Sur benko de juĝatoj sidis. ....

'54 Min puno tute ne timigus, ; Mi ĝin eĉ volis en animo, ; Ĉar sole ĝi min liberigus ; De min preminta ŝarĝa krimo. ....

'55 sed mi timegis, ke ĵurintoj ; Min sen bedaŭro ekkulpigos ; Kaj de aliaj mortigintoj ; Min tute ne diferencigos. ....

'56 Ho, Dio! mi, honesta homo, ; Eterne estos kondamnita ; Kaj mia senmakula nomo ; De ĉiuj estos mallaŭdita! .....

### **'& Parto naŭa:**

'57 Jenekparolis prokuroro; Mi tre atente aŭskultadis, – ; Sed frapis forte mia koro, ; Kaj mi nenion komprenadis. ....

'58 Li finis; advokat' komencis ; Pravigi min, – li multe penis; Kaj lin kompreni mi intencis, ; sed vane: ree ne komprenis! .....

'59 Nur tion bone mi sciiĝis, ; Ke nun mi estas en juĝejo, ; Ke malbonulo mi fariĝis ; Kaj estos en malliberejo. ....

### **'& Parto deka:**

'60 Ĵurintoj iris konsiliĝi, ; Post ili ankaŭ nun juĝantoj ; Eliris, – eble por nutriĝi. ; Mi restis sola kun gardantoj. ....

'61 Duono pasis nur da horo, ; Ĵurintoj dum konsiliĝadis, ; Sed mia malfeliĉa koro ; Centjaron kvazaŭ suferadis! .....

'62 Priskribi, kiom min turmentis ; En tiu temp' – ne estas eble, ; Kaj kion tiam mi trasentis, ; Por mi eĉ mem ne kompreneble! .....

'63 Se povas vi vin mem prezenti ; Starantan antaŭ pafilego, ; Ekpafi preta, – kion senti ; Vi devus, – mia jam timego, .....

'64 Kredeble, estos komprenita; Alie – tute kun nenio ; Ĝi povas esti komparita! ; Esperis sole mi je Dio. ....

'65 Subite pordo malfermiĝis: ; Ĵurintoj kaj juĝantoj venis. ; Al mi kapturino komenciĝis, ; Mi ŝanceliĝis kaj eksvenis. ....

### **'& Parto dekunua:**

'66 Konsciiĝinte, mi min trovis ; Sur lito, hejme; min domanoj ; Ĉirkaŭis, – mi do movi povis ; Nek per piedoj, nek per manoj, .....

'67 Ĉar tute mi ekmalfortiĝis. ; De ŝarĝa krimo pravigita, ; Honesta ree mi fariĝis, ; Sed longe estis mi premita .....

'68 Sed longe estis mi premita ; Per tio, ke animo mia ; De krimo estas pravigita ; Per juĝo homa, sed ni Dia! .....

'69 De tiu tempo mi forlasis ; Jam tute ĉason kun pafilo, ; Kaj, krom fiŝhoko nur, mi ĉasis ; Jam kun nenia batalilo." .....

'70 Li eksilentis. Jam finiĝis. ; Malluma nokto, kun rideto ; Mateno roza proksimiĝis, ; Nebulo flugis sur lageto. ....

'71 Kaj jen, levinte nin, de lago ; Ni kun akiro nun foriris. ; Nur kiam venis hela tago, ; Al domo mia mi aliris. .... )